


Jorge Camacho

La çapo de la sterko-vermo



BILDO 1

La canción DREAMLINE:

When we are going
wandering the face of the earth
wondering what our dreams might be worth
searching that we're only imprints
for a limited time

1. BRAVADO.

Ahora enciendo ^{algunos} ~~unos~~ cigarrillos en las letras
de la casa a PISA. Ahí se juega a HALLÉI la
gesta -

KÄTTIIN KÄTTIIN
KÄTTIIN SIENESSÄ


KONTTUOKKI
TÄI MITTUKU

causa
deca
abra ARABIA (Beate)

riding line 100 FCM


ambros
varane
mim - Pitar

(+ lami, el jover)



Psilocibo (deseño el la kajero de la aütoro).

BILDO2




Psilocibo.

BILDO 3

(Dijo en las 3 horas más o menos), volvió al punto
 en cualquier momento, consciente de que había
 un pensamiento, de cuando no pasaba ("oh, un momento
 oh", "preferirías", es decir, lo importante es prete, etc.)
 de cuando no pasaba por mi mente y que no
 recordaba a menos que me haya otra "cosa"
 a buscar y a comer cosas. Si es posible
 recordar. Jorge me lo leyó SERENA, cuando
 se hace cosas ("como en el relato de Eloy")
 para que sea. Me estáis, que sea el todo
 del estado en un universo paralelo, en el que
 el orden "antes" es en un segundo, pero se
 es imposible. Es un: solo como se
 en la medida de. ZINELES DEL METRO DE
 DOKKASAM: HELSINKI (CASA MARIANA) MÁS LA
 PENSA DE ALVIN TAMMER "LA CIUDAD BLANCA,
 SINDOJA, TURKUA, ~~LAVANIA~~ ~~ZARZAR~~: "ASÍ
 QUE VOY A INTENTAR NO ~~REPERIRME~~ ~~PARA ADELANTE~~.
 VOY DEJANDO PULSA, ^{siguiente} "TIBU" UN PRESENTA: PERDE
 EL CEN-METRO TAANVA. MEN OJA UN JORGE O UN
 ANOJA UN SARKINK LAS. PEROJA, UN POTOS,
 Y ADIVINE UN INTENTE ~~REPERIRME~~ (CARRERA DE
 UN PROPIO EJEC, SOBA CON UN ESPERADO) POR
 PUNDE HA IDO.

SEDA VA LA CANTA LAS OJA MENOS CINCO
 (¿"MILLO ZOTTA?" AHORA NO EN LA CANTA.

BILDO 4
Formulo de psilocibino



Enkonduko

Vodko, haŝiŝo kaj Zamenhof

En septembro, 1991, mi faris unumonatan trajnvojaĝon tra Eŭropo per la junulara bileto *Interrail*. Jen la triangula itinero: Madrido-Helsinko (3 tagojn), Helsinko-Budapeŝto (2) kaj Budapeŝto-Madrido (2). Entute 7 tagojn en kupeoj kaj vagonoj, tamen kun kelknoktaj haltoj por viziti geamikojn kaj kolegojn en pluraj aliaj lokoj: Parizo, Roterdamo, Stokholmo, Upsalo, Utreĥto kaj Provenco.

Nu, kvankam eble duono el la madridaj gejunuloj fumas regule haŝiŝon, pri kio ĉe ni malmultaj ŝokiĝas, vere surprizis min renkonti ne nur polan aŭ rusan vodkon, sed ankaŭ haŝiŝan rulaĵon^o en vespero en la hejmo de amiko en Parizo.

Mi mem neniam fumas tabakon, des malpli mariĥuanon aŭ haŝiŝon, krom eventuale unu aŭ du fojojn en la jaro, se mi troviĝas en amika rondo, kie cigaredo aŭ rulaĵo cirkulas. Tiel do mi agis en ĉi simila okazo, per akcepto de kelkaj fumprenoj akompane al la vodkaj glutoj.

Neniam mi aĉetis haŝiŝan bido^o, tamen tiutempe mi estis iom informita pri madridaj prezoj, kaj mi sciis, ke ju pli norde oni aĉetas, des pli malĉip^o la varo. La prezo iĝas pli kaj pli alta dum la bido ruliĝas de Maroko al Hispanujo, poste trans Pireneojn al Francujo, kaj tiel plu ĝis la fora Nordio^o, malgraŭ doganistoj kaj policaj hundoj.

Jen kial mi certe ne atendis ripetigon de la aventuro dum la cetero de la vojaĝo. Ĉokolado^o ankoraŭ ne atingis finnoj kaj laponojn; krome estas sciata, ke la esperanta junularo sufiĉe abunde drinkas, tamen fumas nur modere kaj modeste, eĉ se temas pri simplaj cigaredoj, tute malkiel Lazaro Zamenhof (kiun ili, parenteze, apenaŭ iom konas).

En kaj el Helsinko

Fine mi venis al Helsinko, en vendreda mateno, kaj tie mi gastis ĉe paro da normaluloj, t.e. da neesperantistoj: Hannu kaj Silja, geumikoj^o. De lundo ĝis vendredo Silja laboris en alia urbo, tiel ke ŝi pasigis kun Hannu nur la semajnfinojn. Post agrablaj sabato kaj dimanĉo kune kun ili, la vesperon de tiu ĉi tago mi restis sola en ilia loĝejo, dum Hannu akompanis ŝin al la stacidomo. Li revenis ankoraŭ frue, kaj tiam demandis min, ĉu mi emas kuniri al la urbocentro por bierumi kaj sperti la noktan etoson.

Mi jesis, kaj do post kelka tempo ni troviĝis en la taverno *Cantina West*, ĉe la promenejo Esplanado, kie ni rendezvis lian kompanon Mikko. Ĉi tiu kovis surprizon: malgrandan bido^o. Mi certe miris, tamen ne oponis, ke ĉi-foje ĝi akompanu la glutojn de blonda biero *Lapin kulta (Oro de Laponujo)*, por mi same bongusta kiel la hispana kvinstela *Mahou*. Ju pli ni babilis kaj konversis, des pli bone ni komprenis, ke, malgraŭ naskiĝo en landoj ege foraj unu de la alia, malgraŭ la limoj, la baroj klimata aŭ lingva, ni tamen estas anoj de unu sama (ĉu nur junulara?) kulturo, kun komunaj manieroj pasigi la liberan tempon (en drinkejo, kun botelo aŭ glaso en unu mano kaj usoneca muziko en la oreloj), komunaj temoj, komunaj ŝatoj kaj gustoj por kelkaj aferoj, komunaj sintenoj. Eble la fakto, ke mi parolis kun ili rekte en la finna, helpis al tio, ke ili ne sentu bezonon plu teni la sekreton, ke ili decidu inviti min en la rondon.

Tiam ili proponis. Jes, unue Mikko kaj Hannu diris al mi ion pri magiaj fungoj, halucinaj aŭ simile, kaj, vidante klaran esprimon de interesiĝo sur mia vizaĝo, ili klarigis pli detale: temas pri fungetoj kun halucinaj efikoj, kiuj daŭras du aŭ tri horojn; oni devas serĉi kaj pluki ilin en paŝtejo ekster la urbo ktp. Hannu demandis, ĉu mi emas kunveni, kaj li diris ke, se jes, li telefonos min de sia laborejo la morgaŭon aŭ postmorgaŭon por ke ni renkontiĝu kun Mikko por kuna ekskurso.

Li telefonis la mardon matene. Sed unue mi informu la leganton pri grava ero en la historio. Tial, ke mi havis la intencon viziti la sekvan tagon amikinon en, ni diru, la urbeto Naantali, proksime al Turku, kaj ĉar mi ankoraŭ ne sciis pri la horo de mia alveno al ŝia urbeto, ni interkonsentis, ke ŝi telefonu min por konfirmo en la marda vespero, ĉar mi mem **ne povos** ŝin telefoni, kaj ke ŝi ne hezitu reprovi kaj plu provi ĝis iu en la loĝejo respondos ŝian vokon.

Estis mardo, la 17an de septembro, 1991. Posttagmeze ni trajnis al vilaĝo 15 km (aŭ eble minutojn) for de Helsinko. Por Hannu estis jam la kvara aŭ kvina fojo; por Mikko, propra-konfese sperta, la kiu-scias-kioma. En mia novica kapo kirligis scivolo kun timo kaj kun la plezuro petoli kaj riski. Parenteze: kun amuzo mi komparas ĉi okazon kun pli frua iniciĝo, kiu fine montriĝis tute blaga, en Tripolo, Libio, en 1987: kredante blankan pulvoron kokaino, plurope kaj dupe kun samvojaĝaj kolegoj universitataj, mi fakte snufis nur pistitajn aspirinojn. Sed ni revenu al la historio. Antaŭ ol iri al la paŝtejo ni aĉetis kelkajn bierojn. Dumvoje mi petis de ili kompletigajn klarigojn pri la efikodaŭro kaj pri la eventualaj sekvoj kaj sekvaĵoj. Tial, ke la efiko de alkoholo nenion aldonas al tiu de la fungo, mi decidis ne fortrinki mian bieron; per tio mi certigis ioman purecon de la eksperimento kaj samtempe evitis la suferon de morgaŭa postebrio. Fine ni atingis la lokon, kaj tiam Mikko, nia gvidanto, instrukiis nin pri la ĝusta procedo aŭ eĉ proceduro.

Ni kaj ĝi (konatiĝo kun la fungo)

La fungo nomiĝas psilocibo^o (*Psilocybe semilanceata* aŭ, en Meksikio kaj Teksaso, *Psilocybe mexicana*). En Usono ĝi ricevas la nomon **liber-ĉapeleto**. En Hispanujo, mi ne scias. En Finnujo ekzistas almenaŭ du popularaj nomoj, *silokki* kaj *lantamadonlakkki*. Tial, ke la helbruna ombrelforma psilocibo kreskas sur paŝtejoj, finnoj nomas ĝin **la ĉapo de la**

sterko-vermo¹. Kaj verdire ĝia eta ĉapelo (1 cm alta kaj 1,5 cm diametra) ja similas al la ĉapo de paŝteja vermo: la tuta talo (funga ekvivalento de tigo), inter 8 kaj 10 cm longa, diametras nur 2 aŭ 3 milimetrojn! (vd. ĝin sur BILDO 1 kaj BILDO 2). Parenthese, ne ĉiuj finnoj scias pri ĝia ekzisto, kaj ne multaj scias ion alian ol svagajn onidirojn pri ĝi. Fine, ĝia azteka nomo *teonanakatl* signifas **dia karno**, t.e. mirinda aŭ, alivorte (kiel proponas Ricardo F. Albert Reyna), mistera.

La tagon karakterizis serena, eĉ varma vetero. Ĉiu el ni devis serĉi kaj kolekti po 25 fungetojn - jen la preciza dozo. Foje, ne kapabla mem distingi en ĉiuj okazoj, mi konsultis Mikkon pri unuopa ekzemplero, kaj laŭ la respondo reĵetis ĝin sur la grundon aŭ metis ĝin en rudimentan plastpaperan konuson. Post ĉirkaŭ du horoj mi plukis nur dekon; Hannu, siajn 25; kaj Mikko rikoltis ne nur sian dozon, sed ankaŭ tiujn 15 mankantajn al mi.

Pli malpli je la sesa ĉiu el ni englutis siajn psilocibojn, tie surloke. Ni simple manĝis, maĉis ilin krudaj. Mi memoras ilin iom sengustaj. La manoj, male, odoris je tero, je herbo, je kampo. La efikoj tuj komenciĝis. En la trajno, se mi fermis la okulojn, mi plu vidis la silueton de la fronte-sidanto, sed mi vidis ĝin neonluma, sur nigra fono, kun sparkoj aŭ neonsagoj ene kaj ekstere. Ankaŭ la voĉoj kaj la ridoj ŝanĝiĝis, pleniĝis je eĥoj kaj resonoj.

Vanuo° kaj reapero de la lingvoj

Ni alvenis al la centra stacidomo. Hannu kaj Mikko volis iri al universitata drinkejo. Sed mi ne emis. Mi havis alian planon: reiri hejmen kaj skribi, skribi sub kaj pri la influo de la fungoj. Tial mi diris al ili, ke mi ne volas tuj eniri fermitan ejon, ke mi unue iom promenos, kaj ke poste mi serĉos ilin en la interkonsentita loko. Evidente ne ili, sed mi mem lasis min sola, sola en halucina labirinto.

Ekzemple, dum la tuta tempo ni estis parolintaj nur en la finna, kaj jen mi sentis min nekapabla retrovi en mia cerbo la lingvojn esperantan kaj hispanan. Imagu, mi diris al mi mem, se pro la fungoj ambaŭ lingvoj neniam revenus, kaj mi do devus, jam en Hispanujo, komuniki kun miaj geamikoj kaj parencoj per ia finna ne denaska, sed klase lernita; se mi povus kompreni nek ilin nek i.a. miajn verkojn aŭ la ceterajn tekstojn (librojn, leterojn) en mia hejmo: mi restus fremda ĉie, same norde kiel sude, en mia lingva ekshejmo.

Eĉ por paŝi mi devis cerbumi, koncentriĝi: necesas unue levi la dekstran kruron, movi ĝin antaŭen, poste la livan ktp. Fine mi simple aliĝis al la fino de homgrupo aŭ homvico kaj ekpaŝis post ili(n), sekvante sen ajna penso ties iron.

En 1991 estis sole unu metroa linio en Helsinko, kun nur du eblaj direktoj, nome *Itään* (orienten) kaj *Länteen* (okcidenten). Sed ial mi ne sukcesis koncentriĝi pri la signifo de la finnaj vortoj. Tiam mi ekpensis: ĉi-foje temas pri logiko; tial, ke la lingvo esperanto logikas pli ol la finna, mi uzu ĝin nun por trovi la vojon al la loĝejo de Hannu kaj Silja. Kaj, efektive, la vortoj **orienten** kaj **okcidenten** impresis tiel kristale klaraj, ke mi tuj povis, en ambaŭ sencoj de la vorto, orientiĝi nesten.

Elirante el la metroa faŭko mi viziis ne la ĉiaman grizan panoramon el betonaj konstruaĵoj, sed nudan horizonton sendoman kaj senhoman sub ĉielo bunta, vulkana, neona.

Hejme, ferminte la pordon, mi provis duŝi min sens-esploro, sed vane (t.e. la gutoj tiom tiklis, ke mi preferis eksperimenti ion alian). Temis ja pri hiperestezo: eĉ trinkata kran-akvo gustis superbonege, prafonte kaj praarbare. Poste mi provis masturbi min, same vane: la fotoj sur la porna° revuo reliefis kaj vibris kvazaŭ vivaj. Sekvis surpriza malkovro: en la banĉambro, stare antaŭ lavabo kun spegulo, mi sentis kaj perceptis mian nudan korpon iel nove neandertala. Fine, refoje en miaj vestoj, mi sidiĝis ĉe tablo kun kajero, globkrajono kaj horloĝo, dum la ĉambron okupis la muziko de l' kanada rokmuzeika ensemblo *Rush* (la tutan tempon la sama kasedo°: *Roll the bones*).

Kaj tiam mi ekskribis. Dum du kaj duona horoj, kun la regula akompano de telefonvokoj intence senrespondaj. Kaj jam de la komenco, de la unua vorto, mi skribis en la hispana: nerimarkate, la perdita lingvo reaparis.

Nek fikcio nek beletro

La teksto *La ĉapo de la sterko-vermo* konsistas en esperantigo de la sentitola teksto skribita hispanlingve sur lernejana kajero. Mi klare avertas: ĝi estas nek fikcia nek beletra. Se paroli senkompleze, temas ne pri rakonto, sed pri ia speco de mensa lakso aŭ de vorta tenesmo. Kiu volas legi, tiu legu ĝin kiel dokumenton aŭ kiel kuriozaĵon. Por traduki la hispanan *escribir* mi do ne kuraĝis uzi la vorton **verki**, tiel ke por ĝi aperas ĉi-tekste preskaŭ ekskluzive la verbo **skribi**, cetere plene pravigebla (vidu la kvaran subsignifon en *PIV*), krom pli simila kaj etimologie proksima al la originalo.

Evidente mi strebis al plejeble laŭvorta traduko, kio koncernas ankaŭ la transskribon (vd. ĉi-sube). Mi do ripetas, ke temas ne pri beletro, sed pri ia dokumento aŭ atesto, kiun eble kelkaj trovos interesa el vidpunkto psika, farmacia, lingva aŭ akademianologia.

La transskribo

La originalon mi manskribis per majuskloj, por ke legontoj trovu ĝin laŭeble plej klara kaj facile legebla; sammotive mi transskribas ĝin per minuskloj, kaj la apenaŭajn minusklajn vortojn aŭ frazojn de la originalo mi redonas tie ĉi per VERSALOJ.

Mi respektas kiom eble la originalan interpunkcion, cetere influitan ne malofte de la (*PAG*-)esperantaj reguloj. Restas sama la uzado de krampoj rondaj (O) kaj rektaj (|)ⁱⁱ, ĉu simplaj, ĉu duoblaj, ĉu kombine; same pri la uzado de haltaj kaj dividaj strekoj.

Inter krampoj angulaj (<>) aperas, post asterisko (*) kaj en malpli grandaj literoj, la teksto de notoj aŭ tekstoj marginaj k.s. de la originalo; sen asterisko aperas litero aŭ vorto aldonita poste al la teksto (ekzemple la titolo). Inter > kaj <, la teksto de paĝo, kiun la eldonisto estu bonvolinta reprodukti ĉi-libre kiel BILDO 3. Por rapida konsulto vd. la apartan liston de uzataj simboloj.

Kursive legeblas ĉiuj vortoj en fremda lingvo kaj titoloj de libroj aŭ kantoj; ĉiuj titoloj de la kantoj de *Rush*, konkrete el la kasedo *Roll the bones*, kursivas en la teksto (sentraduke en la angla lingvo); kursiveco de esperanta vorto aŭ frazo signifas, ke ĝi aperis en esperanto en la originalo, tamen nemarkita. Ortografiajn kaj lingvajn erarojn mi fidele (mis)tradukas kaj markas per substreko; jen kial mi redonas per **grasaj** literoj la substrekojn de la originalo (krom ankaŭ la citojn de esperantaj vortoj aŭ frazoj).

Mi esperas, ke iu trovos interesa (eble eĉ pli ol la teksto mem) la amasegon da notoj. Se paroli pri nomoj, pluraj estas hispanaj: *Amado, Fátima, Javier, Laura, Raquel, Santiago* (foje ankaŭ minuskle kaj plurale: **amadoj, santiagoj**). La mian mi esperantigis de *Jorge* al **Georgo**. El la finnaj, nur *Kaisu* veras; la ceterajn mi modifis aŭ maskis al la iel similaj *Hannu, Martta, Mikko, Silja, Tiina*. Kial? Unue kaj due, ĉar eble iu el ili kaptiĝos iam en la reton de esperanto, kaj ĉar mi nenium konsultis pri volo aŭ malvolo eterniĝi en ĉi libreto.

Terminoj kaj droga° slango

Plurfoje oni vidos, ke glosita vorto (signita per °) apartenas al la droga slango (en la glosaro: d). Tial, ke tia slango (kiel slango ĝenerale) apenaŭ ekzistas en esperanto, mi kvazaŭ devis rekrei ĝin por *La ĉapo de la sterko-vermo*. Verdire mi preferis fari konkretajn proponojn ol lasi la kampon neplugita, kiel oni agis ĝis nun. Krome mi preskaŭ ĉiam klopodis por aldoni al vorto laŭeble jam *PIVa* slangon kromsignifon; temas ofte pri naŭtikaj° kaj aeronautikaj terminoj, ĉar miaopinie ili liveras metaforojn internacie kompreneblajn. Ĉiuj slangoj en la glosaro estas proponoj, kiuj espereble utilos al verkantoj aŭ tradukantoj de artikoloj, rakontoj kaj eĉ poemoj. Tial, kvankam mi ne uzas ilin en la libreto, la glosaro entenas ankaŭ la terminojn **horso**, **orfi**, **peranto** kaj **plonĝi**; la vorton **horso** lanĉis Felip Artero i Lozano, konstanta kunlaboranto de *Kontakto*, kaj mi tre ĝojis vidante, ke ĝi tuj proponas la ege bezonatan **horsulo**, pure esperantan; fine, la vorton **rulaĵo** mi uzis kaj aŭdis parole, en konversacioj kun samideaj esperantistoj.

Signoj uzataj

- <> post asterisko (*) kaj en malpli grandaj literoj, la teksto de notoj aŭ tekstoj marĝenaj k.s. de la originalo; sen asterisko aperas litero aŭ vorto aldonita poste al la teksto (ekzemple la titolo).
- ® sago en la originalo.
- ¬ sago en la originalo.
- » signifas "simile al, analoge al".
- ★ vorto aŭ frazo skribita rekte en esperanto, markita per steleto en la originalo.
- ° glosita vorto.
- d droga slango
- * kelkajn vortojn (aŭ tuj) antaŭ komenca angula krampo ĝi indikas resp. la ekziston de noto en la originalo kaj la koncernan tekston.
- ◀ la teksto de kajera paĝo, kiun la eldonisto estu bonvolinta reprodukti ĉi-libre kiel BILDO 3.
- # komenco de paŭzo.
- [--] paŭzo (en la skribado).
- @ fino de paŭzo.

Ĉiuj ĉi signoj, escepte de °, d, <>, <*> kaj ➤ ◀, respondas al samformaj aŭ similformaj signoj en la originalo.

< La ĉapo de la sterko-vermo >

Mardoⁱⁱⁱ. Je 7.17 vespere en Helsinko.

Antaŭ (+ -) unu horo komenciĝis la efikoj de ĉi fungoj, kies nomo estas *silokki*. Mi sidas en la hejmo de Hannu kaj Silja, aŭskultas muzikon de Rush ("*Rull the bones*"), provas koncentriĝi sur tio, kion mi faras, kaj kion mi pensas. Ĉio ĉi similas nenien-kondukan labirinton, daŭre malfermiĝas pordoj.

La muziko: nekredible, la ĉoj, aŭdeblas ĉiuj muzikiloj [telefonas iu, sed mi ne povas respondi, almenaŭ ne nun, ĝis post unu aŭ du horoj].

Mikko diris ke la efikoj daŭras du aŭ tri aŭ eĉ kvar horojn.

Muziko, aŭdo + tekstoj de la kantoj + vido (bildoj, koloroj, kiel en dancejo), memoro, odoro (la odoro esti serĉinta fungojn dum 2 horoj en loko kie ĉevaloj paŝtiĝas)

Merdon.

Ĉiuj sensoj samtempe.

Estas tempo.

"*Vitun sien!*"^{iv}

Mi provos esti racia.

Tial, nur unu lingvo, la kastilia.

Kvankam mi volonte telefonus iun, ekzemple Marttan, mi tion ne faras, tiel ke, se Hannu alvokos, la lineo ne estos okupata. Se mi nek mem vokas nek respondas la telefonon, ĝi do restas libera kaj Hannu ne scias kie mi troviĝas.

Tiel, ĝis la efikoj pasos, ĉio okazas *nŭr* al mi, al mi kaj al mia cerbujo. Tial mi preferas ne respondi la telefonon, kaj voki nenium ajn. Mi skribas, kaj sufiĉas. Ne necesas, ke mi diru al iu ajn. Krome, la kalkulo estus enorma (en finnaj markoj), ne devas resti tiaj spuroj, kio ajn fizika.

Je 21.00, 2200, 2300 mi devas paroli kun Martta por diri al ŝi ke mi venos vendrede, ke mi jam aĉetis la biletojn, ... sed je tioma horo. Tiam ĉio estos jam pasinta.

— Mi ŝatus

Ĉu mi skribas nur por mi? Por la kompanoj en Madrido? (tial mi elektis la kastilian. Mi volas ke ili legu ĝin en oktobro en Madrido, se mi iros unu vesperon ĉe Raquel-n, bierumante ktp...

Mi devas turni la kasedon (estas pli amuze) (aŭ pli komplike): mi vidas, skribas, aŭdas...

Ankaŭ, ke Martta legu ĝin *post morgaŭ* en Naantali, ke vi legu ĝin. Mi vidas la trajnon, aŭdas la voĉojn de la grupo. Mi havas memoron por la paseo kaj por la futuro. Certe, kiam mi legos tion ĉi, mi trovos ĝin ridinda, kvazaŭ karikaturado de Adolfo Bioy Casares^v (jen okulsigno^o al Amado, al Jesús, al iu "kunvojaĝanto"^{oo*}) <* Mi ne skribu ion kio ___>

Se iu kiel Martta legos ĉi tion, ne estas sekretaj lingvoj; ŝi parolas multajn. *O.K.*^{vi} Estas amuze skribi, pripensi kion mi skribos, pripensi kion mi pensos. Tute kiel descendi en la metroon kaj vidi tiom da ~~tuneloj~~, tiom da koridoroj, tiom da ebloj, tiom da itineroj. Mi volus skribi ion pri ĉiuj postrestintaj stacioj (la trivita vojaĝ-metaforo).

Ne povas esti memoro, rememoro de ĉi sperto, ĉar memorado signifus ke la menso respertas [("*Do we have to say goodbye to the past. Yes, I guess we do.*")* ĉion. <* □ □> Kio ne eblas. La menso ne povas resperti ĉion. Mi do profitos de ĉi "vojaĝo" por verki kant-tekstojn laŭ la muziko kaj la tekstoj en la angla.

Teksto pri "*Ghos of a chance*"

v -v -v v-

Ne eblas verki... "*All the choices we made*"

Se mi skribas apude ← la tekston en la angla mi povos scii, kiu kanto inspiris ĝin al mi.

El ĉiu frazo en la angla, milionoj da ebloj en la ~~kastelea~~ kastilia. Same en pensado. Ĉiu penso senfine disbranĉiĝas, kiel fraktaloj^{vii}, Hola Christer!, la uzo de krampoj rondaj kaj rektaj kiel en la stilekzercoj^{viii}, falo en la abismon (kiel en la filmo "La mastro de l' ringoj") aŭ eniri en tunelon, en vivan organismon (varmaj koloroj, invitas, intima), ne timante la falon, skribi tiel, sen kroĉi sin tro al ĉio antaŭa, rekte antaŭen, skribante nur **minimumon** ("*You just don't get it*"), la tempo daŭras pli longe, la kantoj daŭras eterne, jam kelkan tempon mi atendas alvenon de la kanto "Vi vetas la vivon" kun siaj elnombradoj, perfektaj por la okazo, skribi plu >(ankoraŭ estas nur dek antaŭ la oka), mi reiras al la paseo kiam ajn, konscia pri ĉio pasinta^{ix} ["*ohi*", "*on mennyt ohi*"^{ox}, "*preteriris*", t.e. gravas ja *preter*, *ohi*], pri ĉio kio trapasis mian menson kaj kion mi neniam rememoros krom se mi iros unu vesperon serĉi kaj manĝi fungojn. Jes, eblas ĝin rememori. Al vi, Georgo, legonta ĝin **serena**^{xi}, mi volas postlasi spurojn (kiel en la novelo de Bioy) por ke vi sciu ke mi estis, ke vi estis, ke mi estas en paralela universo, kie okazas tiom da aferoj en sekundo), sed mi scias ĝin malebla. Similas iradon tra mikso de la metroaj tuneloj de Roterdamo kaj Helsinko (oranĝa koloro) plus la filmo "La blanka urbo" de Alain Tanner, sinua, zigzaga, ~~sinuosa~~, ~~zigzagoza~~. Mi do klopodu por ne ripeti min. Antaŭen. Mi postlasas spurojn, el- / for-ĵetas miajn vestojn el la trajno-metroo-tramo por ke iu Georgo aŭ Amado aŭ Sherlock pluku ilin, la spurojn, kaj divenu aŭ provu diveni (karikaturado de mia propra stilo, ĉefe en esperanto) kie ĝi iris.

Refoje la kasedo. Kvin ant la oka ("*Ĝhanko totta?*" Nun mi rimarkas< ke en la finna ne ekzistas ĝ. Iri al la kasedo, reveni kaj plu skribi (nu, kaj, parenteze, pisi - foje mi ridetas -) 1) kasedo 2) pisi 3) ~~reek~~ skribi [kiel germanoj 1) 2) 3) kvadratkapuloj^{xii}] mi volas skribi ĉion sed ne povas; noktiĝis, en la neprejo mi devis decidi ĉu veni tien ĉi kaj skribi plu

aŭ ĉu iri al la liĉambro (estis verda lumo, kiel en filmo de Spielberg). Mi retroiras la tunelon (← Lovecraft^{xiii}, la kaŝa mondo en ni mem) kaj skribas. Drogo, halucino konstantas dum jarmiloj, la homo kiu ĝin serĉas, ĝin trovas, ĝin englutas kaj haluciniĝas, kaj pensas. Sed ne la homo skribonta. Tio postas. Jen la diferenco kun neandertalulo, kun la praaj amerikano aŭ finno en la koniferaj arbaroj, la glaci-epoko, feloj kaj frostoj: li ne skribis. Ekas la dialogo (kiel en Miguel Espinosa^{xiv}) (la plezuro retrovi vertiĝon, la plezuro vertiĝi, perdiĝinta por momento) (estas la oka dek du kaj **tio** ne ŝanĝiĝas, la tempo pasas). Dialogo inter mi kiu ankaŭ englutis (risiko je "*kärpässieni*", je *amanita muscaria*^{xv}) sed kiu **krome** skribas kaj havas horloĝon kaj konscias la tempopason (kvankam vi havas la stelojn, la konstelaciojn, la tempon pasantan kun la nokta ĉielo), dialogo inter vi ne skribanta kaj mi kiu skribas. Jen la diferenco. Kiel la Rubik-kubo^{xvi}: ĉi magio gravas nur en la momento, kiam vi spertas ĝin. Neniama poste. Tiam vi samtempe estas inicito kaj majstro kaj vi konversas kun majstroj kiuj ĉiam ekzistis sed ne povis skribi kiel mi aŭ Georgo faras. Ili profitas de la okazo kaj skribas pere de ĉi Georgo aŭ de ĉi Carlos Castaneda^{xvii}. Ili bezonas ĉi tiujn por spiri. Mi perdis ĝin. [Javier: mi ne volas uzi grafikajn simbolojn kiuj fakte ne emfazas sed ja senvalorigas la esprimadon; la manko en Santiago^{xviii}]. [La substrektoj].

Parte mi estas ĉi Georgo utiligata aŭ fruktuzata, mi estas ili.

Ali-parte, vojmeze (ringmondo^{xix}) mi volas dialogi kun Javier kaj Santiago, kaj en tiu momento mi estas Georgo, ulo volanta dialogi kun vi ĉiuj^{xx}, komunikiĝi.

Se la homo kiu drogiĝas, kiu ĉiam drogiĝis (metaforo: li = ili KTP) (kiel "la Homaro" marŝanta antaŭen, en Sánchez Ferlosio^{xxi}), se tiu homo volas, unuparte, paroli tra^{xxii} mi (tra min → eraro / maleraro → Laura), kaj, aliparte, ankaŭ Georgo volas skribi samtempe, jen ni havas konflikton, tial ke ambaŭ ne povas uzi samtempe la saman kanalon, jen la problemo (sonas la telefono; ĝi ĉesis soni, estas la oka dudek). Jen tio racia (mi parolos kun Martta poste pri la vojaĝo), la volo skribi, fronte al tio ne-racia, la spertado kaj sentado^{xxiii}. Se mi skribas por komuniki ĉion ĉi al amadoj, santiĝoj ktp, tiam mi obstaklas la kanalon uzatan de la drogiĝanto aŭ drogiĝantoj por eliri al la ekstera mondo, por eliri aŭ veni en ĉi tempon, en ĉi momenton. Nun mi certas ke por mi ja gravas skribi ĝin, obstakli, malgraŭ ĉio, ĉar morgaŭ aŭ poste aŭ post kelka tempo (kio ne havas sencon en la mondo de la drogita^{xxiv} menso) mi serenos. Mi povintus sidi nun en ajna *kapakka*^{xxv} kun Hannu kaj Mikko kaj disvagi disvagi^{xxvi}, ridante, trinkante bieron kaj elspezante monon (la drogiĝinta homo spertanta kaj ŝatanta senti), sed anstataŭe mi venis kaj skribas (Georgo, la alia partulo de la dialogo, volanta registri) (la skribanta homo). Jen la problemo. Mi malpermesas al. Mi, la skribanto, malpermesas al **la spertanto** haluciniĝi plene, kvankam mi scias ke skribante mi haluciniĝas. Tial mi nenion maltrafas skribante, tial mi scias ke [la kasedo] ke ne estus pli bone sidi en *Vanha*^{xxvii} dirante kaj pensante kretenaĵojn. La 20.25.

Se mi revenas al la kajero, mi refoje ekdrivas, eniras en la labirinton.

Sed se mi ĉesas skribi, se mi stariĝas, jen mi normalas, mi racias. Mi povas ŝanĝi^{xxviii} la kasedon (tion mi faras) kaj mi povas telefoni Marttan (kion mi ne faros) kaj paroli al ŝi kurte pri la bileto. Mi povas ankaŭ iri al la strato kaj aĉeti ion en *kioski*^{xxix} kaj reveni (malgraŭ la antaŭaj malfacilaĵoj) sen ke iu ajn rimarkus ion ajn. Mi povas ekstari kaj agi (ekz. mallaŭtigi la muzikon por ke ĝi ĝenu nenium, nul^o najbaron) aŭ sidiĝi kaj skribi. Ĉi tion mi elektas. La dialogon. Kion volas tiu kiu drogiĝas kaj drogiĝis (ĉiam, eterne)? Certe kiam mi ekstaras kaj iros al la banĉambro (mi soifas ĝis nekredebla grado) kaj trinkos kaj ĉesos skribi (estas la 8a kaj duono), mi scias ke tiam la drogiĝanto puŝos flanken la skribanton, la arbarulo venkos dum kelka tempo. Mi ekstaros (lasos ĉi signon: #), iros trinki kaj spertos ("*Do we have...*"). La homo el la arbaro, el la densejo, la "lapono" estos la "mastro" (kretena metaforo). Sed, satigita mia soifo (← Espinosa, Camilo^{xxx}), mi revenos tien ĉi, al la tablo, por skribi, kaj tiam la skribanto estas tiu, kiu vivas (ne kiu venkas), kiu vivas; nur unu el la du dialogantoj vivas; la parolanto vivas; la silentanto → silento = "morto" = vakuo, sonora^{xxxi} vakuo.

O.K., bonvenon *Mister*^{xxxii} Neolitiko. Mi scias ke mi revenos.

#.

[---]

@

Paŭzo. *Tauko*^{xxxiii}. (20 AŬ 25 ANTAŬ LA 9A)

MI TRINKIS.

EN ĈIU MOMENTO MI INTENCIS REVENI TIEN ĈI, AL LA KAJERO). SE MI NE ESTUS INTENCINTA TION, MI ESTUS VAGINTA TRA LA SAMAJ MENSAJ LABIRINTOJ (NUN MINUSKLOJ; INTERESE!) (*MR. WATSON; D-RO LIVINGSTON* MI KONJEKTAS^{xxxiv}) SED SEN SKRIBI (majuskloj pli klaras; Georgo, vi legos ilin pli facile).

Unuflanke jen tiu volanta mensajn labirintojn sen skribi, volanta ekstari, paŝi, vidi, pensi kaj ★*dis*-kio-ajn

Kaj, aliflanke, tiu (okaza kreteno) volanta reiri al la tablo por skribi.

Oni interpretu la parentezon (okaza kreteno) kiel ion forigeblan: 1) tiu volanta... 2) tiu ... kreteno volanta

Jen la problemo de la epitetaj subpropozicioj rilataj^{xxxv}. Ĉu la lingvo, la sintakso, povas akomodi sin al la drivo, la distriĝo, la vago de l' pensado?

(vagi ≈ disvagi ≈ ★*dis*)^{xxxvi}

Ne, ĝi ne povas.

Ne povas, sed provas.

La skribanto scias sin nepova, tamen li provas. (Mi provis, komencu de ĉio, masturbu min, sed nun mi scias ĝin malebla).

Kiam ajn mi ekstaros mi devas fari la signon, la markon # , kaj post residiĝo la signon @ por limi la skribadajn paŭzojn, la fojojn kiam mi permesas al mi esti la herbulo aŭ permesas al la herbulo nesti en mi.

Sonis la telefono ← io kio okazas kaj ĉesas, al kio mi ne povas reiri. Ambaŭ signoj limas la dialogon, la transiron de unu mondo al la alia, de unu dialoganto (kiu skribas) al la alia (kiu ne).

(Elnombradoj de "Bet your life").

Nun mi ne plu timas stariĝi kaj drivi sen skribi. Mi scias ke mi lasos la markon kaj ke, pli aŭ malpli frue, mi revenos al la kajero (feliĉe mi havas kajeron) kaj ke mi skribos la duan markon. Mi emas ekstari kaj drivi, ĉar la markoj (kiel en la intesto de la tenio^{xxxvii}) permesas al mi kroĉiĝi kaj esti aŭ reesti la skribanto. Baldaŭ mi ekstaros, trinkos kaj turnos la kasedon kaj haluciniĝos kaj eble kiam mi revenos al la kajero mi ne daŭrigos la saman temon, sed tute ne gravas. Eĉ se la parolo^{xxxviii} finiĝos, la markoj restas (» dum dioj ne ŝanĝiĝos nenio ŝanĝiĝis^{xxxix}).

Fino de la kasedo.

#

@ 7 antaŭ la 9a. Kanto "Like lovers and heroes..."

Mi pisis.

Telefono: mi povas telefoni, sed ne respondi al voko (por la okazo ke mi drivus).

Nun ne gravas al mi ĉu Hannu scias ke mi ĉi-tieas (se mi telefonas kaj li telefonas samtempe kaj mi okupas la lineo; cetero estas presk mi ne supozas ke li volos telefoni - mi pensas ke en li ne okazas la sama dialogo - mankas la kajero - krom se li zorgas pri kie mi troviĝas, kio okazas al mi ktp, tial ke ni ĝisrevidis en la metroo kaj mi ne iris al *Vanha*; por ili mi ankoraŭ estas ie en Helsinko, promenante, aŭ side sur benko, lopante°).

Krome (plia "se...", plia ★ "se..." plia "jos..."^{xl}), estas 3 aŭ 4 minutoj antaŭ la 9a kaj mi ne intencas telefoni Marttan ĝis almenaŭ la deka aŭ la dek-unua. Ne urĝas. La efikoj pasos. Ne gravas se ŝi telefonas kaj mi ne respondas. Gravus ke eble la efikoj daŭros ankoraŭ unu aŭ duonan horon, ke mi spertu kaj skribu, ke okazu ke fariĝu ke kreiĝu la dialogo, jes, tiel, ke la dialogo kreiĝu, ne nur ke estu dialogo, aŭ ke la dialogo estu, aŭ ekzistu, sed ke ĝi kreiĝu (male ne temus pri dialogo - » dialektiko).

Mi povas sidiĝi, apogi la dorson kaj pensi senplie.

...

Sento de trankvilo, de interna kvieto.

...

Feliĉe mi trinkis nur du bierojn sur la kampo kaj la alkoholo ne malhelpis estiĝon de la lukto-dialogo aŭ lukto/dialogo ("ymmarrätko?"^{xli})

...

Okulsignoj al mi mem (kaj, survoje, al la ceteraj).

...

Mi provas la fermon de la okuloj (kiel mi faris en la trajno venante, tamen sen rapido kaj sen rideco aŭ ridemo, sen la kretena rideto)

...

En malpli ol du horoj (estas la 9a kaj kvin, mi volus diri la naŭa kaj **1** < * @ **1** EGALAS AL LA 5 MINUTOJ >) mi skribis sep foliojn ambaŭflanke plus la sekvon, t.e. pli-malpli dek kvin paĝojn (mi povis kalkuli tion senprobleme, ĉesante aŭ skribi aŭ kiam ĉesis skribi).

» Jen - serĉe serĉe mi tri versojn metis^{xlii}.

Iu tel-as.^{xliii} Mi scias aŭ pensas ke temas pri Martta sed mi ne povas respondi.

Povas esti Martta aŭ Hannu.

Ĝis la deka aŭ la dek-unua mi ne respondu.

Mi pensis ke mi skribis pli.

Nun skribas mi. Skribante ĉi tion mi apertas° pordon al la neskrubanto.

Oni plu telefonas kaj ankoraŭ ne estas pli ol la 9a kaj sep aŭ ok.

Povus esti Silja. Feliĉe mi ne respondas la telefonon.

Mi scias (kredas) ke estas Martta, ke estas vi, Martta.

Tiu Georgo, estanta ne pli ol parto aŭ cep-tavolet^{xliv} (la ekstera)* < * la amiko de Tiina, ¿Tiina? ĉi-matene sur la kafeja teraso° en Porthania^{xlv}, mi kun Kaisu kaj Fátima > de la skribanto havas dialogon, multe malpli intensan aŭ densan (ne "interesana") kun eksteraj personoj.

T.e. dum en aŭ tra Georgo okazas la ĉiama eterna dialogo inter la skribisto^{xlvi} kaj la drogiĝinto (Sinuhe kaj... kiu?) (mi pensas ankaŭ pri li, pri [vi] skribinta Gilgameŝ-n^{xlvii}), samtempe tiu surfaca Georgo volas paroli aŭ interŝanĝi informojn kun aliaj individuoj. La plej proksima, geografie tempe kaj cirkonstanc (ĉi-vespere, t.e. pro la interkonsento ke ŝi telefonu min je la 9a kaj je la 10a) (estas la 9a kaj kvarono), t.e. la plej proksima estas Martta.

Sed ĉi dialogo de Georgo kun individuoj sekundara<s> en ĉi momento de la sperto. Ni formetu ĝin kiel manĝan^{xlviii} dialogon kaj revenu al la dialogo inter la skribisto kaj la drogiĝinto [drogo → pocio → eliksiro^{xlix} (male al veneno)].

De antaŭ kelka tempo mi volas turni la kasedon (ĉiam la sama kasedo, re kaj refoje).

#

@

La kuloj (pikoj sur mia vizaĝo fronte al la spegulo).

La kasedo.

Trinkante akvon mi ne kuraĝas razi min (mi ne scias kion mi farus se mi provus razi min en ĉi **stato** ← "stati"^l).

Nun mi sentas aŭ vidas pli bone la diferencon inter "esenci" kaj "stati", inter esenci drogita kaj stati tia.

Ĉi diferenco estas la lukto - dialogo.

Kiu esencas drogita ne povas esti plene tia; la skribanto ne povas nur skribi, ne povas **nur-kaj-ekskluzive** skribi; en ĉiu el ambaŭ troviĝas io el la alia [estas la 9a kaj dudek], kaj tiuj du ambaŭoj kune egalas al **stati** drogita, al tiu kiu status drogita, nura stato, intermiteco.

Nun, skribinte tiom, mi scias kien troviĝas la tri lingvoj (la kastilia, la finna kaj esperanto). (Oni aŭ ŝi telefonas; la 9a kaj dudek-du). Ne plu esta Babelo, ne plu estas konfuzo de la lingvoj. Nun mi ja povus konversi, dialogi kun iu. Aŭ paroli telefonon. Ne plu necesus eviti dialogon (kiel en la metroo, venante tien ĉi).

Tiam mi evitis la dialogon, rigardojn kaj miajn proprajn ridetojn.

Mi timis perdiĝi, kiel mi perdiĝis en miaj ebrioj, en miaj iamaj ebrioj ("*Do we have...*"); ebrio, jen vorto kiu havas **nenion** por fari kun tio nuna. Mi ne **statas** (verbo stati; kiel mi dirus ĝin en la finna aŭ en esperanto?) mi ne statas ebria. Mi statas alio^{li}.

Sed mi timis esti la ebriulo kiu vomas kaj perdas tornistrojn kaj memoras nenion.

Tial mi volis veni tien ĉi laŭeble plej baldaŭ kaj tial mi tuj venis. Feliĉe mi povis, mi iom misfartis tiam.

Estis iom da alkohola ebrio, da misfarto (bona vorto) en ĝi.

Nun mi supozas ke la efikoj senfortiĝas. Mi parolas pri mi (pri mi drogita) pasee. Nek la tunela vertiĝo nek la labirinto nek la sekvo).

Iu telefonas. La 9a kaj duono.

"*Somehow we find each other...*" ® (Mi devas kopii la kasedajn tekstojn) (Mi volas ĉi kasedon, aĉeti ĝin.)

Kvankam ne plu estas "*la obtuzeco*" de la komenco (tiu senforma kaj svaga nuboj el tonoj rozaj, violaj kaj grizaj kaj neontuboj kaj eĥoj kaj zumoj), kvankam ĉiumomente estas pli da Georgo kaj malpli da dialogo, kiam mi skribas la vorton "vertiĝo" mi revenas al la vertiĝo, kaj skribante "dialogo" mi revenas al la dialogo/lukto, aŭ reiras al ties scenejo, dum sekund-dekonoj (kaj nun vere temas pri dekonoj de sekundo) mi sentas kion mi sentadis, kion mi trasantis^{lii}, vivadis/travivis, kvankam sen (la) samtempo. Jen la granda diferenco. Antaŭe ĉio samtempis.

← Ĉi frazo indas pli detalan studon. Oni observu [Camilo kaj Espinosa] la uzon de tensoj, de preteritoj ((kompari kun *preter*)). Aliflanke ĝi memorigas min pri "Nun ankoraŭ estas ĉiam"^{liiii} de Machado - ~~Maura~~ (Ĉu Machado drogis sin?^{liv}). Antaŭe ĉio samtempis. Nun estas dudek kvin antaŭ la 10a (jen io pure vida; = 7 antaŭ la 10a = dudek kvin antaŭ la deka). ((^{lv})).

Ĉiumomente malpli sense.

— ~~Nun mi pensas ke~~ Mi pensas ke nun mi povus apercepti senprobleme la muzikan laŭton.

Refoje "*Bet your life*". Ĝi finas la kasedon. Kiam ĝi finiĝos, mi ekstaros, turnos ĝin kaj trinkos. [Elnombradoj]. Sed nun la markoj estas nuraj taglibraj konvencioj, simplaj notoj sur la marĝeno. Inke sur papero, ili ne estas la markoj, ĉizitaj sur la trunko de betulo kies ŝelo elŝiriĝis en ĉifonoj. Ne plu fuĝo en la arbaro (kvankam, rememorante ĝin, mi revivas aŭ resentas la fuĝon) (la skribanto, nuda, en nokto-tago da silento, fuĝe el la scianto/sentanto, serĉe eliron, vojon, padon al ĉi tablo, ĉi kajero kaj ĉi globkrajono).

Mi decidis neglekti (esperantismo - latinismo: ← *NEGLIGENCIA*)^{lvi} la fuĝon ktp.

Dudek aŭ kvarono antaŭ la 10a. La kasedo ĵus elsaltis.

(Nuraj konvencioj)

#

@

- Nu, vidu, Georgo: nun vi aŭskultas vian voĉon.

En la komenco ne estis lingvoj. Feliĉe (← jen la keĵlo pajlo ĉi-vespera) mi decidis skribi kastilie.

En la metroo, la plej proksima, malgraŭ la tumulto de la silento, la zumo, la plej proksima - la finna. La plej racia (serĉi metroan stacion, orientiĝi ktp) - esperanto. La kastilia apenaŭ aperis.

Komence aldoniĝis al ĉi dilemo - debato inter la volo skribi kaj la volo senti, banala, stulta kaj pajaca volo masturbu min, kvazaŭ la masturbaj plezuroj kaj la drogaj pejzaĝoj povus aldoniĝi, kvazaŭ eblus multoblige unu per la alia, kvazaŭ alkoholo povus multoblige la drog-efikojn.

Ĉe drogo, same alkoholo kiel pornografio valoras nulon. Ili valoras merdon (en senco mona, ne morala - puritana).

Kaj drogo estas la fungoj, la micetoj.

Ĉio cetera ne estas drogoj. Ankaŭ ili estas merdo.

Kiu formanĝas zomilon^o, kiu englutas L.S.D.n tiu ne konas la agon serĉi, mane kaj fingre, trovi fungojn, **maĉi** fungojn, kiel oni ĉiam faris. Tio ne ŝanĝiĝas. Kiam oni ne plu povos iri al la kamparo, inter la fervojajn relojn aŭ fi-kien ajn, tiam la mondo ne plu estos la sama mondo. Ĝi estos alio, alia merdo.

Je la deka mi telefonas - aŭ eble ne - Marttan. Mi pensas, ke mi ne plu enfalos tra/en la puton/labirinton.

Hannu on juuri tullut. Klo on 9.55 21.55. Suomen kielikin on tullut yht'äkkiä^{lvii}

MARTTA TELEFONIS; VENDREDE IE EN LA URBA LIBROTEKO. ŠI SERĈOS KAJ TROVOS MIN.

Estas la deka kaj ses minutoj. Dum mi parolis telefone kun Martta estis iom da vertiĝo/labirinto. Nur iom.

< FINO >

Postparolo

En decembro, 1994, okaze de unutaga vizito al la Centra Oficejo de UEA en Roterdamo, mi donacis al mi mem, krom la grandioza *Bensona Universala Esperanto-Metodo* (vd. en *Enciklopedio de Esperanto*, sub **Benson**), ankaŭ la ne malpli valoran, kvankam multe pli modeste, eĉ askete eldonitan [*Deklingva*] *Manlibro pri Politiko* (editoris Stefan Maul, eld. FEL 1994).

Ne ekzistas vortaro sen eraro. Ekzemple, sub la vorto **polico** eta sago referencas la kapvorton **KGB**, kiu tamen, bedaŭrinde, malestas en la libro. Neniu ĝeniĝas pro tiaj neeviteblaj mankoj. Kio ja ĝenis, ĉagrenis, konsternis min estas la plene intenca elekto de la vorto **drogaĉo** por traduki (?) la anglan *drug*, la francan *drogue*, la germanan *Droge*, la hispanan *droga* aŭ la finnan *huume*.

Kial **aĉ**? Certe Hitlero estis aĉa, fia, monstra ktp, sed ĉu *PIV* devus ŝanĝi sian difinon pri li al "homaĉo, fondinto de naziismo"? Ĉu *PIV* ekdiru de nun, ke komunismo estas "socipolitika doktrinaĉo", aŭ kapitalismo - "ekonomika reĝimaĉo"? Imagu la jenan difinon:

Volapuk/aĉ/o. Internacia lingvaĉo, kun strange misformitaj vortoj, elpensita ĉ. 1879 de la aĉulo J. M. Schleyer kaj, laŭmerite, rapide malaperinta antaŭ E-o.

Absurdaĵo. Same absurda kaj skandala mi trovas la decidon en *Manlibro pri politiko*. Tamen certe bezonatas vorto por ĉi nocio. La misnaskita **drogaĉo** tute ne taŭgas, kaj mi rekomendas al *Monato* rezigni je ĝi. Ankaŭ ne la *PIV*-suplementa **toksiko**, paŭsaĵo el la franca, kreita kontraŭ ĉiuj reguloj de la esperanta afiksado per aldono al la vorto **tokso**, t.e. veneno, de la sufikso **ik**, t.e. scienco, tekniko aŭ arto. Evidente **toksiko** povas signifi nur **venenologio**, kaj ne eblas uzi ĝin por etikedi ian ajn substancon. En 1990, en la traduko *Letero el Palestino*, eldonita de LKK, mi lanĉis la neologismon **narko**, kiun intertempe preskaŭ neniu uzis (ĝi tamen enŝteliĝis en la vortaron franca-esperanto de Ĵak Le Puil k.a.). Tial mi volonte rezignas je ĝi favore al la sola formo, kiu, malgraŭ anatemo kaj ekskomuniko en la *PIV*-suplemento, estas daŭre uzata en la parola lingvo de la esperantaj junularo kaj maturularo: la internaciega **drogo**.

Fakte mi plene malkonsentas pri la pretendata aĉeco de drogoj. En la enkonduko mi mencias, ke aztekoj nomis psilocibon *teonanakatl*, t.e. karno dia (aŭ mirinda). Surbaze de unutaga sperto mi emas samopinii, kaj personon, kiu epitetus tian sperton aĉa, mi mem senhezite kvalifikus barbaro aŭ analfabeto, sendepende de tio, ĉu per psilocibino oni vizias superbajn paradizojn aŭ vertiĝotrudajn ŝeolojn.

Ekzistas homoj, kiuj daŭre kunprezentas drogojn, sekson kaj violenton kiel kaŭzojn de ĉiaj problemoj de la homaro. Kiel stranga triunuo! Kial ne ankaŭ religiojn, naciismon, futbalon, kapitalismon, beletron, humuron kaj kuirarton? Tiaj potencialaj cenzuristoj, legintaj nek *Fahrenheit 451* nek *Usher II* de Ray Bradbury, abundas almenaŭ en la eŭropeca mondo kaj do, kvankam malpli videble, en nia esperanta movadeto.

Feliĉe, tamen, ĉiutage plivigliĝas la debato pri la rezultoj de la ĝisnuna malpermeso de la konsumado de drogoj. Pli kaj pli da homoj (juĝistoj, medicinistoj, poliestroj, psikologoj, verkistoj ktp) argumentas por leĝigo (aŭ nura senpunigo) de la konsumado, kaj do ankaŭ de la aĉetado (eventuale sub ŝtata kontrolo), kio igus la prezojn ege malpli altaj kaj samtempe kontribuis al la malfortiĝo de la drogaj mafioj°.

Mi diru nun, ke mi staras ĉe ilia flanko. Mi ne ignoras la problemojn kaŭzigitajn de drogkonsumado, sed la ĝisnuna decido rigardi ĝin krimo kaj do ĝin persekuti kaj laŭeble puni kondukis onin al sakstrato: la komenca problemo nur pligraviĝis, kaj nepre necesos enorma kunstrebo por rekonduki la situacion al stato pli facile traktebla el vidpunktoj socia kaj medicina. Male, ni vojas al abismo aŭ marĉo, mankaj je solvoj.

Fakte la dirinda direblas tre simple: kondiĉe, ke neniu alia rekte suferas damaĝon, ĉiu adolta homo rajtas libere drogi sin. Aŭ preĝi. Aŭ verki. Aŭ onani°. Aŭ stiri aŭton. Aŭ lerni la anglan sed ne esperanton. Aŭ inverse.

Mi ŝatus povi verki iom longan atikolon pri la temo aŭ, prefere, traduki la preskaŭ 100-paĝan studon de Antonio Escohotado *Las drogas. De los orígenes a la prohibición* (*Drogoj: de ilia origino ĝis la malpermeso*, eld. Alianza Editorial, serio Alianza Cien, Madrido, 1994), sed nun mi tute ne tempas por tio.

Anstataŭe mi invitas la legintojn de ĉi libreto debati pri la temo sur la paĝoj de, ekzemple, *LKK* aŭ *Monato*. Dankon pro via pacienco!

La aŭtoro
 Madrido, 95.01.15

Glosoj

<i>mmi</i>	<i>La Majstro kaj Martinelli</i> , Georgo Kamaço, eld. Iltis-Eldonejo, 1993.
<i>mp</i>	<i>(Deklingva) Manlibro pri Politiko</i> , editoris Stefan Maul, eld. FEL, 1994.
<i>ng</i>	<i>Neologisma glosaro</i> , Henri Vatré, eld. Artur E. Iltis, 1989.
<i>piv</i>	<i>Plena ilustrita vortaro de esperanto</i> , G. Waringhien k.a., eld. SAT, 1981.
<i>*piv</i>	implice en <i>piv</i> (ne kiel aparta kapvorto).
<i>pu</i>	<i>Poemo de Utnoa</i> , Abel Montagut, eld. Pro Esperanto, 1993.
<i>pve</i>	<i>Plena vortaro de esperanto kun suplemento</i> , E. Grosjean-Maupin k.a., eld. SAT, 1980.
<i>s</i>	<i>Suplemento de piv</i> , G. Waringhien k.a., eld. SAT, 1987.
<i>sll</i>	<i>Sur la linio</i> , Georgo Kamaço, eld. Bero, 1991.
<i>tb</i>	<i>Tirano Banderas</i> , Ramón María del Valle-Inclán, trad. Fernando de Diego, eld. HEF, 1993.
aperti	[<i>pve, tb, mmi</i>] (tr.) malfermi.
bido	[aldone] d peco aŭ buleto da haŝiŝo [H. <i>china</i>].
ĉipa	[<i>piv, s</i>] malmultekosta; malĉipa : multekosta.
ĉokolado	d [pro la koloro kaj aspekto] haŝiŝo [H. <i>chocolate</i>].
drogo	[aldone] stimula, halucina aŭ stuporiga substanco, ekzemple kafo, tabako, haŝiŝo, alkoholo, LSD, heroino, kokaino ktp [vorto anstataŭanta la absurde formitan <i>PIV</i> -Suplementan toksiko , la ideologie reakcian drogaĉo (<i>mp</i>) kaj la pli frue proponitan narko]; drogi : (tr.) doni al iu tian substancan.
fraktalo	matematika figuro kreita per plurfoja (aŭ senfina) apliko de simpla transformregulo al malkomplika figuro (ekzemple la figuroj de Koch, Cantor, Menger kaj Mandelbrot estas fraktaloj) [H. <i>fractal</i> ; vd. la artikolon de Gianfranco Cazzaro <i>Orda mondo kaosa</i> , en <i>MONATO</i> , numeroj 10-11/1993, resp. p. 16-19 kaj 15-17].
Hamburgo	[aldone] hamburgaĉo : kuirita peco da pistita viando kun formo de plata disko, kiun oni kutime metas manĝocele en tranĉitan panbulo kun fromaĝo, cepringoj, spicaĵo aŭ saŭco ktp; hamburgaĉojn oni aĉetas kaj konsumas en hamburgejo .
horso	d heroino [H. <i>caballo</i> , A. <i>horse</i>]; horsulo : heroin-dependulo, heroinomaniulo [H. <i>yonqui</i> , A. <i>junkie</i>].
kasedo	[<i>s</i>] sonbendo; kasedilo : magnetofono.
lopi	[aldone] (ntr.) (f) d perdi, pro aŭ per drogo kaj dum ĝi efikas, kontakton kun la realo [H. <i>flipar</i> , A. <i>to get stoned</i>].
luĉo	[<i>sll</i> ; proponita de Manuel Halvelik] maĉo, maĉo.
mafio	[<i>mp</i>] sekreta sicilia krim-asocio celanta malhelpi la oficialan justicon favore al siaj interesoj; ĝenerale, ĉia sekreta krimula asocio aŭ societo.
naŭto	[<i>sll, pu</i>] naviganto [kp kun argonaŭto , astronaŭto , kosmonaŭto]; naŭti : (ntr.) navigi; naŭtiko : navigado, navigacio.
nordo	[aldone] Nordio : Norda Eŭropo aŭ Nordeŭropio, t.e. Skandinavujo plus Finnujo kaj Islando.
nul	[<i>ng, tb, mmi</i>] neni(j)(n), nenia(j)(n); simile al ĉi , oni uzu ĝin nur adjektive, sed ne pronome.
okulsigno	vd. sub signo .
onani	[<i>mmi</i> ; el onanismo] (ntr.) masturbi sin.
orfo	[aldone] orfi : (ntr.) (je drogo) (f) d senti fortan bezonon drogi sin post kelktempa manko de drogo [H. <i>tener el mono</i>]; [analoge] (je io) bezonegi ion; orfeco : stato de sendroga drogdependulo, drogmanula sindromo [H. <i>mono</i> , A. <i>cold turkey</i>]; anstataŭ orfanto aŭ orfulo eblus uzi, pli simple, la sensufiksna orfo .
pejotlo	[<i>*piv</i>] eta cilindra kakti (<i>Lophophora williamsii</i>) sen dornoj, kovrita de silkeca lanugo, kun unusolaj rozklaraj floroj, kreskanta en Meksikio kaj Teksaso, kie oni rigardas ĝin sakrala ^o aŭ sankta planto, kaj kiun indiĝenoj (pro ĝiaj narkotaj efikoj) uzas por elteni la malsaton kaj penadon proprajn al longa marŝo; ĝi entenas diversajn alkaloidojn, i.a. meskalinon, potence halucinan [vd. en <i>PIV</i> sub meskalino].
per	peranto : [aldone] d detala ŝakristo de drogoj [H. <i>camello</i> , A. <i>drug-pusher</i>].
plonĝi	[aldone] (ntr.) (f) d rapide perdi la efikojn de halucina drogo kaj rezulte fali en inerton aŭ deprimon; malzomi ^o [H. <i>tener un bajón</i>]; plonĝo : drogslanga termino uzebla ekvivalente al postebrio por drogoj aliaj ol alkoholo.
porna	[<i>ng, mmi</i>] pornografia.
psilocibo	halucina fungeto (<i>Psilocybe semilanceata</i> ; <i>Psilocybe mexicana</i>); psilocibino : droga substanco entenata de psilocibo.
riserĉi	(tr.) la <i>PIV</i> a reserĉi , t.e. science esplori (objekton, temon) [analoge al ripeti]; la vorto riserĉisto egalas do nek al esploristo (de landoj, regionoj) nek al enketisto (justica, polica).
ruli	rulaĵo : d mane kunvolvita aŭ kunrulita cigaredo mariĥuana aŭ haŝiŝa [H. <i>porro</i> , <i>canuto</i> , A. <i>joint</i>].

sakrala	[<i>ng, s</i>] apartigita for de la komuna uzado pro religia karaktero kaj inspiranta respektoplenan timon; malprofana.
signo	[aldone] okulsigno : okulmovo (fermo de unu okulo) por signi al iu ion, kion oni ne povas pli klare esprimi [kp kun la <i>PIV</i> aj figrosigno , kapsigno kaj mansigno] [H. <i>guiño</i> ; uzebla ankaŭ figurasence]; formo preferinda al la <i>PIV</i> -Suplementa palpebrumo , kiun oni prefere uzu por rapida fermo kaj malfermo de ambaŭ palpebroj (laŭ la unua senco en <i>PIV</i>), kaj al okulumo , kiu plu signifas ŝeton de avida kaj amdezira rigardo al iu (same).
teraso	[aldone] ebena areo apud konstruaĵo (kutime trinkejo, drinkejo, kafejo, restoracio aŭ hotelo) kie oni povas sidi por manĝi aŭ trinki; ekstera kaj trotuara parto de tia konsumejo [H. <i>terrazza</i> , A. <i>terrace</i> , SF. <i>terassi</i>].
tribadino	tribadismulino [mallongigo konforma al la lingvouzo de la hispana verkisto Miguel Espinosa; vd. noton 14].
umiko	[slange] pli-ol-amika persono, kun kiu oni kutime umas , t.e. havas specialajn rilatojn kaj faras diversajn aferojn, ofte (sed ne nepre) seksajn [A. <i>boyfriend</i> , SF. <i>poikaystävä</i>]; umikino : tia personino [A. <i>girlfriend</i> , SF. <i>tyttöystävä</i>].
vanui	[<i>ng, tb, mmi</i>] (ntr.) malaperi.
vojaĝi	[aldone] (ntr.) (f) d troviĝi sub la efikoj de halucina drogo [H. <i>estar de viaje</i> , <i>tener un viaje</i> , <i>viajar</i> , A. <i>to be high</i> , <i>to be on a trip</i>].
zomi	[aldone] (ntr.) (f) d rapide eksenti la efikojn de halucina drogo, eklopi° [H. <i>tener una subida o un subidón</i>]; zomilo : LSD-dozo [H. <i>trip</i> , <i>tripi</i> (misskribe en la originalo: <i>tripit</i>)]; malzomi : plonĝi°.

Notoj

-
- ^{i.} Traduko de la finnlingva fungnomo *lantamadonlakti*, kies lastan vorton *lakti* mi redonas ĉi-kaze rekte per **ĉapo**, kvankam por paroli pri fungoj prefere oni uzu la PIVan terminon **ĉapelo**. Parenthese, ĉiujn finnajn vortojn oni devas akcenti sur la unua silabo (superproparoksitone).
- ^{ii.} Rektaj krampoj estas, en mia sistemo, pli firmaj kaj fortikaj ol la rondaj (kaj do iel superaj).
- ^{iii.} Mardon, la 17an de septembro, 1991.
- ^{iv.} Finnaj vortoj signifantaj **Piĉaj fungoj!** (laŭvorte) aŭ **Merdaj fungoj!** (laŭidee). Enestas deklinacia eraro: la plurala nominativo de *sieni* (fungo) estas ne *sienĵt* sed *sienet*.
- ^{v.} Argentina verkisto (1914), literatura kolego de Jorge Luis Borges, konata pro siaj romanoj, ĉefe *La invención de Morel* (*La invento de Morel*) kaj rakontoj, ekzemple *La trama celeste* (*La ĉiela veŝto* aŭ *La ĉiela intrigo*). En ĉi rakonto, kiun mi aludas en mia teksto, Ireneo Morris, arma piloto, flugas en apenaŭ distingeblan paralelan universon ne konsciante sian transmondiĝon. Tie li serĉas amikon de sia patro, doktoron Carlos Alberto Servian, kiu, komprenante la fenomenon, petas lin retroflugi (t.e. reveni al nia mondo) kaj reserĉi lin, la doktoron, por komuniki ĉion okazintan. Servian do sukcesas transdoni mesaĝon al alia si en alia universo pere de la piloto, kiu mem rimarkas nenion.
- ^{vi.} Angle: **bone, en ordo, mi konsentas**.
- ^{vii.} Pri fraktaloj mi konversaciis en Upsalo kun Christer Kiselman, matematikisto kaj akademiano, kiun mi salutas en la sekva frazparto.
- ^{viii.} Temas pri *Stilekzercoj* (1947) de Raymond Queneau (1903-1976), kies esperantigon fare de István Ertl eldonis LKK en 1986.
- ^{ix.} Duone vortluda traduko: la vortoj **paseo**, **pasinta** kaj **okazinta** havas la saman formon en la hispana lingvo.
- ^{x.} Finnaj vortoj signifantaj resp. **preter** kaj **preteriris**, kiel la teksto mem tuj klarigas.
- ^{xi.} Mi uzas tie ĉi la vorton **serena** kun la senco **ne plu sub la efiko de la fungoj**; pro la aparteco de la efikoj de psilocibino mi ne opinias taŭga la uzon de la vortoj **malebria** aŭ **sobra**.
- ^{xii.} Kliŝo, kiun hispanoj kutime aplikas al germanoj (kvankam enketoj kaj riserĉoj^o pravas, ke germanoj laboras averaĝe malpli da tempo en la jaro ol hispanoj).
- ^{xiii.} La usona verkisto Howard Philips Lovecraft (1890-1937), aŭtoro de rakontoj samtempe fantastaj kaj hororaj, en kiuj, por ekzemplo, aperas arkanaj pordoj por iri de nia mondo al mondoj oldaj, ombraj, teruraj kaj ĥaosaj, popolataj i.a. de monstroj reptilece (mal)homaj.
- ^{xiv.} Hispana verkisto (1926-1982), apenaŭ konata en aŭ ekster Hispanujo. Dum lia vivo publikiĝis nur kelkaj el liaj romanoj, kaj oni ne tre atentis ilin. Tamen dum la lastaj jaroj oni venis al la konvinko, ke lia verkaro estas unu el la plej originalaj, altnivelaj kaj valoraj kreitaj en la hispana lingvo en la dudeka jarcento. Elstaras liaj sekvaj romanoj: *Escuela de mandarines* (*Mandarena lernejo*), *La tribada falsaria* (*La mensoga tribadino*^o), *La tribada confusa* (*La konfuza tribadino*), *Asklepios, el último griego* (*Asklepio, la lasta greko*) kaj *La fea burguesía* (*La turpa burĝaro*), nur postmorte eldonita; la vorto **dialogo** aludas ĉi lastan romanon.
- ^{xv.} Resp. finna kaj latina nomoj de la venena muŝfungo aŭ muŝ-amanito.
- ^{xvi.} Ludilo konsistanta el manipulebla plasto-kubo, kaj postulanta uzadon de ia matematikeca logiko. Ĉiu el la ses edroj havas apartan koloron kaj estas dividita en po naŭ egalaj kvadratoj moveblaj horizontale kaj vertikale kaj intermikseblaj kun tiuj

de la aliaj edroj. Eke el ajna senorda aŭ misorda situacio la ludanto devas reordigi la kubon tiel, ke ĉiu edro restu nur unukolora.

xvii. Aŭtoro de *The Teachings of Don Juan (La instruoj de Don Juan, 1968)*, kie li taglibre rakontas kaj poste strukture analizas siajn spertojn pri drogiĝo per pejotlo^o (*Lophophora williamsii*), daturio (*Datura innoxia*) kaj psilocibo (*Psilocybe mexicana*) gvidate de Don Juan, sorĉisto aŭ ŝamano de la meksikia gento *jaki* (H. *yaqui*, A. *Jaqui*). Ĉi libron mi eklegis en miaj gimnaziaj jaroj, tamen nek finis nek duonlegis ĝin, ĉar tiam mi trovis la tekston nekomprenebla kaj teda. Dek kvar jarojn poste, supraĵa tralego por la pretigo de ĉi notoj faris pozitivan impreson.

xviii. Mi aludas la hispanlingvan originalon de *Letero el Palestino*, de Santiago Alba, kies esperantigon, cetere, eldonis LKK en 1990.

xix. Aludo al la sciencfikcia romano *Ringworld (Ringmondo, 1970)*, de Larry Niven, kiun mi tamen ne legis. Kial do aludi per la titolo? ĉar por momento mi konceptis la mondon ringa, tiel ke eblus transiri same al **interna mondo** (interne de la ringo: la mondo de la ŝamanoj), kiel, teorie, ankaŭ al ia **mondo ekstera**.

xx. Sola tradicia maniero traduki la hispanan *vosotros*, t.e. la pluralan **vi**. Ĉu ne preferindas la formo **viuj**, proponita de Blazio Vaha en sia tre interesa romano *Adolesko*?

xxi. En sia verko *Mientras no cambien los dioses, nada ha cambiado (Dum dioj ne ŝanĝiĝos, nenio ŝanĝiĝis, 1986)* la hispana romanisto kaj eseisto Rafael Sánchez Ferlosio (1927) brile argumentas kontraŭ la alegorioj La Homa Aventuro, La Homaro aŭ La Homo, kiuj prezentas ĉiujn nuntempajn individuojn en la formo de unu sola Nuna Homo, kaj, plue, ĉiajn ĉi diverstempajn majuskulajn Homojn sub la formo de nur unu, La Homo, senmorta kaj eterna, iranta antaŭen (kaj eventuale ankaŭ supren) nur rekte, kuraĝe kaj ne flankiĝante, ale al La Futuro. Laŭ ĉi alegorioj ne gravas la sangoprezo (t.e. kiom da milionoj da personoj mortis, -as kaj -os), kondiĉe ke La Homo mem daŭre progresas.

xxii. La hispana *a través de* signifas same **tra** kiel **per** aŭ **pere de**. Mi provas redoni en esperanto gramatike eraran uzon de tiu prepoziciaĵo, pri kiu uzo iam atentigis min mia amikino Laura (vd. tuj poste).

xxiii. Aŭ **sensado** (ambaŭ vortoj samas en la hispana).

xxiv. Plurfoje, por simpligi, mi uzas **drogita** anstataŭ la pli preciza **drogiĝinta**.

xxv. Finne, **drinkejo**.

xxvi. Figurasence.

xxvii. Mallongigo de *Vanha Ylioppilastalo*, t.e. **Olda Studenta Domo**, universitata drinkejo en Helsinko.

xxviii. Temas fakte pri la ago **turni** la kasedon.

xxix. Finne, **kiosko**; en finnaj kioskoj aĉeteblas ĵurnaloj, gazetoj, trinkaĵoj, glicirizo, *salmiakki* (maĉaĵo aŭ suĉaĵo el amonia klorido, simila al glicirizo), kolbasoj, hamburgaĵoj^o ktp.

xxx. Rolulo en la romano *La turpa burĝaro*, de Miguel Espinosa.

xxxi. Aŭ **sonanta**.

xxxii. Angle, **Sinjoro**. Iom poste aperas ĝia kurtigo: *Mr*.

xxxiii. Finne, **paŭzo**.

xxxiv. Aludo al la famaj frazoj *Elementary, my dear Watson (Elementaĵo, kara Watson)* kaj *Dr Livingstone, I presume (D-ro Livingstone, mi konjektas)*; la unuan diras Sherlock Holmes al sia helpanto Watson en la detektivaj romanoj de Arthur Conan Doyle (1859-1930); la duan diris la angla esploristo Henry Norton Stanley (1840-1904) al la samlanda David Livingstone (1813-1873), ĵus trovinte lin borde de Tanganjiko la 10an de novembro, 1871.

xxxv. La esperanta frazo **Mi vidas la domon, kiun bombo detruis** teorie povas signifi same **Mi vidas la domon detruitan**

de bombo kiel **Mi vidas la domon, detruitan de bombo**. En la hispana kaj aliaj lingvoj oni povas distingi ambaŭ sencojn de la unua frazo per uzo aŭ neuzo de komo, samkiel en la ĝin-sekvaj ekzemploj. En esperanto tio ne eblas, kaj do por marki klare la duan sencan necesus aldoni ekzemple la adverbcon **cetere**.

xxxvi. En la hispanaj verboj *desvariar* (ĉi-tekste: **drivi**), *distraerse* (**distriĝi**) kaj *divagar* (**disvagi**) troveblas eĥo de la esperanta prefikso **dis**, samkiel okazas, cetere, en la verbo **distri** mem.

xxxvii. Aludo al iam verkota rakonto pri tenio kiu, se tiel diri, skribas sur la interno de la intesto de sia envivato aŭ enloĝato.

xxxviii. En la kvara *PIV*a senco: serio da frazoj aŭ versoj, pri unu temo, direktataj al publiko.

xxxix. Vd. noton 21.

xl. La vorto **se** en la hispana, esperanto kaj la finna.

xli. Finne: **ĉu vi komprenas?** Mankas du tremaoj el tri; en la finna, la literoj supersignitaj per tremao (**ä, ö**) estas vokaloj tute aliaj ol la sentremaaj (**a, o**), kaj alfabet-orde lokiĝas en la fino de la vortaroj, post **v, (w), (x), y** kaj (**z**) (la literojn **w, x** kaj **z** oni uzas nur en pruntvortoj).

xlii. Kvara verso de la por hispanoj tre fama *Soneto pri l' soneto* de Félix Lope de Vega (1562-1635) en traduko de K. Kalocsay en *Tutmonda Sonoro*, p. 329. Anstataŭ **serĉe-serĉe** mi preferus **ŝerce-ŝerce**, konforme al la originala *burla burlando*.

xliii. Kurtigo de **telefonas**.

xliv. Aliaj eblaj tradukoj: **folieto, ŝeleta, membrano, haŭteto**. Mi elektis la probable mallogikan **tavoleto**, tamen pli konforman al la ideo kaj senco de la hispana *capa*.

xlv. Konstruaĵo de la Helsinka Universitato, en la urbocentro.

xlvi. Uzante la hispanan vorton *escriba* mi kutime pensas pri skribistoj egiptaj, konkrete pri skulptaĵo, la t.n. sidanta skribisto (nun en Luvro); tial mi tuj poste aludas la romanon *Sinuhe, egyptiläinen* (*Sinuhe, la egipto*, 1945) de la finna verkisto Mika Waltari (1908-1979).

xlvii. Sumera heroo de la plej malnova epopeo, verkita aŭ kompilita antaŭ ĉ. 4000 jaroj.

xlviii. La vorto **manja** signifas, ĉi-kuntekste, de **manjoj** (karesformo de **Maria**; hispane: *maruja*), t.e. tipa mezklasa dommastrino, kiĉa, klaĉema kaj televid-ama.

xlix. Ege libera traduko de la hispana *brebaje*, kiu parte pensigas ankaŭ pri **trinkaĵo**.

¹ En la sekvaj linioj mi tradukas la du **esti**-verbojn de la hispana lingvo, nome *ser* kaj *estar*, respektive per **esenci** kaj **stati**, kio redonas la sencan (tamen ne la tonon) de la originalo. La simplan **esti** mi uzas nur por eviti pleonasmon aŭ ripeton en la sama frazo.

li. Ĉu anakoluto, enalago aŭ silepso?

lii. Laŭsenca sed ne laŭtona provo redoni la hispanajn preteritojn imperfektan (*sentía, vivía*) kaj malimperfektan (*sentí, viví*) respektive per sufikso (**sentadis, vivadis**) kaj prefikso (**trasentis, travivis**).

liii. Traduko de la sekva "unuversa universo" de la hispana poeto Antonio Machado (1875-1939): *Hoy es siempre todavía*. Miguel Fernández proponas pli (l)iberan version: **Hodiaŭ ankoraŭ ĉiamas**.

liv. Stulta rimo (*Machado - drogado*) en la originalo.

lv. Tie ĉi mi skribis, inter duoblaj rondaj krampoj, 18-vortan frazon ludantan per du el la signifoj de la hispana vorto *gana*, nome *Ganao* kaj *gajnas* (en futbala senco), aludante rekordanan venkon de Hispanujo super Ganao en fama luĉo° antaŭ pluraj jaroj. Mi opinias ĝin nek tradukebla nek tradukinda.

^{lvi.} En la hispana ne ekzistas la verbo **neglectar* (neglekti), tamen jes la responda substantivo *negligencia*. Por traduki la esperantan **neglekti** oni havas aliajn verbojn (*descuidar, desatender, olvidar, omitir* ktp), tamen mi intence uzis esperantismen aŭ latinismen.

^{lvii.} Finne: **Hannu ĵus venis. La 9.55 21.55. Ankaŭ la finna lingvo revenis subite**